B o l a n t a K a l d r o n o

INFORMILO 280
de la Esperanto –Grupo Bremen
Junio – Septembro 2006

Prezidanto: OstR i.R. Hellmut Grebe, Tel: 0421 396 34 80 **hellmut.grebe@web.de**
Sekretario: D-ro Hans-Walter Krüger, Dordrechterstr. 36, 28259 Bremen,
Tel: 0421 56 19 43. **hw.krueger@nord-com.net**
Kasistino: Ruth Bohn Tel: 0421 13 82 715
Redaktoro: Dieter Hartig, Tel: 0421 847 68 06,

Printempas!
Utilu la sunplenajn tagojn!

Informieren Sie sich über Esperanto in Bremen mittels der oben erwähnten Anschriften.
I**nformiĝu** pri Esperanto en Bremen per la supre menciitaj adresoj, aŭ per vizito en intereto : www.esperanto.de/bremen

Nia nova kunvenejo: **Waller Heerstr 58**. Atentu pri la granda indiko sur la montrofenestro: "**HOKI 58**"! Per tio ni mencios ankaŭ, kie la anoncita programo okazos.

(Aŭtoparki eblas ankaŭ ĉe la "Kino 46")

Nia Programo

La 10an de majo: Grupvespero je la 20a horo en HOKI 58. Estas ja multaj traktendaj aferoj, kiuj restas por nia jubilea festo. Tial ni antaŭvidas interesan vesperon.

La 17an de junio : Somera ekskurso.
Vidu la aldonitan informon !

La 8an de Julio : **Tradicia ĝardenfesto**
en la ĝardeno de S-ino Ruth Bohn.
Ŝi invitas kore niajn gemembrojn
festi la ĉijaran tradician ĝardenfeston
Ek de la 17-a horo vi estas bonvenaj.
Kunprenu, kion vi ŝatas rosti.
Trinkaĵoj estos por vi pretmetitaj.

La ĝardeno situas: Persikoflora (Pfirsichblütenweg) 48.
Der Weg dorthin:
Hinter dem Waller Bahnhof links in die Fleetstraße, dann aber **LINKS** am Fleet entlang bis zum Ende, wo es in den Wiesenweg geht. Ziemlich am Ende rechts befindet sich der Pfirsichblütenweg.
Parkmöglichkeit, eingerichtet für Gäste, ist vorhanden.
Bitte Grillgut mitbringen.

Anoncu vian partoprenon (38 27 15)!

En aŭgusto ni ferias !

Provizore planitaj programoj:
La 13an de Septembro: Grupvespero
La 28an de oktobro : Jubileaj festaranĝoj
La 15an de Novembro
La 13an de decembro : Zamenhoffesto

Retrospegulo

La 11-an de januaro. La unua kunveno en nia nova kunvenejo.

Hg

Ĉiu el ni estis tre scivolema pri la ejo, kiu estonte estu nia grupa hejmo. Ni estis surprizitaj kaj kutimiĝis plej baldaŭ al nia nova renkontejo. Temas pri sufiĉe granda salono kaj eta kuirejo krom ĉiuj necesaj aranĝoj. La flanko al la strato estas granda montrofenestro, kio tre heligas la ĉambron – kaj ebligas al la preterpasantaj homoj rigardon al nia agoj. Tamburas do por ni, kaj varbado estas tre necesa.
Tiel estis la unua kunveno en al jaro 2006 la plej interesa temo. Ni menciis niajn dezirojn al la grupo por la jaro, precipe rilate de la 100-jariĝo.

La 8-an de februaro estis nia jarkunveno.

Raportis Hg

Tio estas ĉiam bilanco pri la pasinta jaro, nia financa situacio kaj fokusado de niaj fortoj por la nova jaro. Ni konstatis, ke nia grupo ŝrumpis kaj pliaĝiĝas minace. Nia varbado ne kontentige sukcesis.
La estraro estis reelektita. La procedo sufiĉe senprobleme evoluiĝis, ĝis la tagorda punkto 10 surtabliĝis: nia jubileo!
Tiu temo estis tre aktive traktita. Evidentiĝis, ke ultaj membroj jam okupiĝis pri tiu afero. Estis tre vigla diskuto kaj montris bonan rezulton. Nia sekretario, Hans-Walter, diligente notis ĉion detale, kion vi en la sekvonta kunveno povos legi.
Nia prezidanto, Hellmut Grebe fermis la kunvenon kun sincera danko por la aktiva kunlaboro. Li esprimis la esperon, ke ni bone sukcesu en niaj klopodoj por Esperanto.

La 8-an de marto. Lumbildprelego pri interesa vojaĝo en Rumanio.

Raportis Hellmut Grebe

Nia grupkunveno okazis en la loĝejo de familio Grebe. Ĉeestis10 personoj. Post mallonga diskutado pri organizaj aferoj por nia 100jara ĵubileo s-ro Grebe raportis pri turisma vojaĝo al Rumanio. La diapozitivoj donis impreson pri la pejzaĝo de la Karpatoj, pri la riĉa tradicio de monaĥ(in)ejoj, pecipe en la nord-orienta parto de la lando (Moldavia, Bukovina = fagolando). Mirindaj estas la preĝejoj ekstere

pentritaj per bibliaj scenoj, por ke la kredantoj kaptu ilin kiel bildrakonto.
En la parto Transsilvania (Siebenbürgen) elstaras la restaĵoj de germana kulturo. La fortikigitaj preĝejoj memoras pri jarcente-daŭra minacado de malamikoj (Tataroj, Turkoj). Subĉiela muzeo prezentas la kaparanan kulturon de diversaj regionoj aŭ triboj.
En Bukarest troviĝas la nesimpatiaj ŝpuroj de la diktatoro Ceausescu : Li detruis minimume 40 preĝejojn en la urbocentro por realigi siajn ideojn pri moderna metropolo kun larĝaj bulvardoj. Impona-timiga estas la registrara palaco (ankoraŭ ne finkonstruita), kies utilon oni povas pridubi. Laŭdire ĝi enhavas 3000 salonegojn! Certe tia konstruaĵo ne preparas la vojon de Rumanio al la Unuiĝinta Eŭropo . Sed la unusemajna vojaĝo montris, ke Rumanio enhavas grandajn tresorojn malkovrindajn.
Kara Hellmut, danke ni aplaŭdis pri la tre interesa prelego. Dankon, ke vi ankaŭ verkis tiujn liniojn. Mi povis tiel senpene sekvi al via prezentado, kiu estis plene da langorompaj lokonomoj.

Printempa kantado en nia nova agrabla kunvenejo.

Raportis Hg

Kunvenis 10 gemembroj kaj du membroj el nia najbara Esperanto-grupo EGU – Esperanto – Grupo Unterweser, s-ino Anne Höpkens kaj s-ro Andreas Kück. Ambaŭ estis kore bonvenitaj kiel reprezentantoj kaj gvidantoj de la meniita grupo.
Hellmut Grebe malfermis la kunvenon kaj prezentis la staton de niaj klopodoj por niaj centjariĝaj aranĝoj.
Ni traktis kaj meditis pri tiu por ni grava entrepeno. Precipe la presaĵoj vekis la intereson.
Pri nia somera ekskurso al Rechtenfleth kaj la vizito de la Hermann-Allmers-muzeo ni estis detale informitaj. Ni dankis al Hellmut pri la bona esplorado de la celo de nia ekskurso, kiu okazas kune kun la Esperanto-Grupo Unterweser.
Hans Walter jam malfermis la fortepianon kaj Hellmut agordis sian gitaron. Ni kantis plengorĝe kaj kun granda plezuro la belajn, konatajn printempajn kantojn. Tradukitaj kantlibroj estis je nia dispono, tiel ke Esperanto ludis ankaŭ tie la plej gravan rolon.
Mallumiĝis jam, kiam ni adiaŭis.
Dankon por ĉiuj agantoj, kiuj ebligis al ni tiun belan grupkunvenon.

Nia ekskurso al Rechtenfleth la 17an de junio

La vojo tien:
Veturu sur la A 27 en la direkto Bremerhaven ĝis elveturejo 12 Hagen.

Dekstren laŭ la trafikindiko " **Sandstedt**". Ĉe la fino de la strato dekstren laŭ la indiko al "**Rechtenfleth".**
Vi preterveturas la straton al la pramo kaj atingas jam baldaŭ Rechtenfleth. En la loko sekvu la vojindikilon al la Hermann-Allmers-muzeo. Antaŭ la muzeo estas parkejo, sur kiu ni renkontiĝos je la 15-a horo.

Post la vizito de la muzeo ni faros promenadon sur la digo.
Ni rigardu de sur la digokrono trans la vasta lando, en kiu fluas la Weser kaj atingas jam baldaŭ en la Nordan Maron.

Proksimume je la 17-a horo ni kafotrinkos en la restoracio Mensing. (Kun la mastro ni interkonsentis pri prezo da 5,50 Eŭro por kafo kaj 2 pecoj da kuko).

Nepre anoncu vian partoprenon ĝis la 14-a de junio (0421 3963480). Se estos sufiĉe da personoj, ni klopodos havi gvidadon en la muzeo. Kaj ankaŭ la estro de la restoracio devas scii la nombron de la kafotrinkantoj.

Wenn wir unsere Sprache pflegen,
wie der Gärtner seine Pflanzen,
nicht resignieren und nicht aufgeben,
dann wird Esperanto weiter leben,
wie so oft in seiner Geschichte.